

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen floras sola, forlasita  
La lasta rozo de l' somero,  
Dum ĝia ĉarma gefrataro,  
Velkinte kuŝas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca,  
Nek roz-burĝono en proksimo,  
Por interŝanĝi la ridetojn  
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,  
Ĉagrene sur trunketo brili;  
Ĉar la karuloj viaj dormas,  
Do iru, dormu vi kun ili!  
Foliojn viajn mi afable  
Disŝetas sur bedeto jena:  
Vi kuŝu apud senaroma,  
Malviva kunular' ĝardenala!

Mi tiel sekvu, kiam pasos  
De l' amikeco flor' fidela,  
Kaj el brilanta amo-ringo  
Elfalos lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraj koroj,  
Sentemaj flugis for el rondo,  
Ho, kiu volus tiam loĝi  
Solece en malvarma rondo?

...

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen la lasta rozeto  
de fora somer'!  
Ĝiaj belaj kunuloj  
jam velkis sur ter'!  
Ne restas parenco,  
ne unu rozflor'  
Partoprenas komplete  
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki  
tutsola, ho roz'.  
Iru dormi kun ili  
en paca ripoz'.  
Nun viajn petalojn  
disŝetas mi for  
Al viaj kunuloj  
sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte  
formortus mi mem,  
Se ne plu min atendus  
amika manprem'.  
Ĉar kiu kun koro  
en tiu ĉi mond'  
Volus loĝi izola  
sen amo-respond'?

...

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.*

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence\\_Bicknell](http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell).*